## Antaŭparolo

Go-ludo progresas ek de unua stadio (formaciado), tra meza stadio (batalado), ĝis fina stadio ('lim-aranĝado'). La stadio de 'lim-aranĝado' estas, ke post ĉiuj bataloj, restas multigo aŭ malmultigo de teritorioj (multigi sian teritorion kaj malmultigi kontraŭulan teritorion). Ĝis la meza stadio, grave estas sinteno, ke fortigu sin kaj ne restigu maltrankvilaĵojn. Sed en 'lim-aranĝado', oni devas gajni poentojn realisme. En 'lim-aranĝado', sin-fortigaj metoj taksiĝas tro sin-gardemaj.

Multaj amatoraj ludantoj estas nek lertaj, nek interesitaj en 'lim-aranĝado'. Ĉefa kialo ŝajnas esti ili volas glore venki en bataloj en meza stadio. Sed, el bataloj kun samnivela kontraŭulo ofte rezultas malgranda diferenco. Do la venko/malvenko ofte decidiĝas en 'lim-aranĝado'. Kaj se vi havas memfidon en via povon de 'lim-aranĝado', vi povas modere ludi en meza stadio.

Ŝajne, multaj amatoraj ludantoj ne volas lerni 'lim-aranĝadon', pro ke ĝi enhavas ĝenan 'legadon' kaj kalkuladon. 'Lim-aranĝado' similas al solvado de 'sinvivigi/mortigi'- problemoj. Sed se vi transiras super la ĝeneco, vi povas ĝui GOon pli profunde. Dum scipoviĝas ludi Goon, se vi ne studas 'lim-aranĝadon', vi nur ĝuas duonon de GOaj amuzoj. Ankaŭ en tiu senco, 'lim-aranĝado' estas kompletigo de GOo.

Mi pensas, ke en arto de GOo estas du fazoj, unu estas povo por 'legi' (baza povo), kaj la alia estas scio de 'esencaj procedoj' (teknikoj memoreblaj). Baza povo decidas veran fortecon. Ĉi tion oni ne povas memori per lernado, sed oni devas penante sin ekzerci. (por tio bone estas perfekte studi 'sinvivigi/mortigi' problemojn, ek de la facilajn problemojn.)

En lernado de 'lim-aranĝado', ankaŭ estas du fazoj, povo por kalkuli, kaj scio de esencaj procedoj. Kreskigi sian povon por kalkuli (gajnon aŭ malgajnon de poentoj) estas kulturi sian povon por legi, la bazan povon.

En ĉi tiu libro, tre detale klarigitaj estas la senco kaj metodo de la gajno/malgajno kalkulado.

Aliflanke, oni devas lerni kaj memorigi al si 'esencajn procedojn'. Vi nepre lernu ilin. Unue klarigitaj estas bazaj 'esencaj procedoj'. Sekvante, diversaj 'esencaj procedoj' estas prezentitaj en ekzercaj problemoj.